

KATOLIKA SENTO

Periodico dell'Unione Esperantista Cattolica Italiana (UECI)

www.ueci.it

"Per la promozione della fratellanza e della comprensione tra i vari popoli di diverse lingue" (Paolo VI)

Periodico bimestrale - Reg. trib. di Vercelli 22.12.1997 n. 306 -
Sped. in abb.post. art. 2 comma 20/c L662/96 - filiale di Vercelli -
Direttore resp.: Mons. Gianni Ambrosio - Dir. e amm.: Vercelli, via Benadir, 62
tipografia edizioni **SAVIOLO** s.n.c. - Vercelli

Anno 90 - n. 5
SETTEMBRE-OTTOBRE 2011

64^a IKUE-KONGRESO (Zagrebo: 16–22 Julio 2011)

De sabato la 16a ĝis sabato la 22a de julio 2011, okazis en Zagrebo la 64a kongreso de IKUE ĉe la Ĉefepiskopa Granda Seminario lokita tuj flanke de la Katedralo.

Temo de la kongreso estis: **"Vi estos malamataj de ĉiuj pro mia nomo. Kaj eĉ unu haro de via kapo ne pereos"**. (Luk 21, 17-18)

Aliĝis trideko da personoj el pluraj landoj (Ĉeĥio, Francio, Germanio, Hungario, Italio, Kroatio, Pollando, Slovakio kaj Siberio). La grupo plej multenombra estis la itala kun 14 aliĝintoj kaj 11 partoprenantoj.

La kongreso komenciĝis sabaton vespere per Sankta Meso en la seminaria kapelo de la Plej Sankta Koro. Dum la tuta kongreso niaj tri pastroj, p. Lajos Kóbor, fr. Pierluigi Svaldi kaj p. Luigi Alfano, kuncelebris ĉiujn mesojn asistataj de diakono János Kirsch. La juna germano Stefan Leping akompanis, ĉe la orgeno aŭ per gitaro, la kantojn de la

mesoj kaj de la laŭdoj, kaj estris ĉiujn aliajn kantadojn de la kongresanoj. Lia muzikemo instigis nin kanti kun li ankaŭ en la distraj momentoj.

Dimanĉon matene, post la matenmanĝo kaj la matenaj laŭdoj, ni ariĝis en salono de la kongresejo por renkontiĝi kun la emerita profesoro Ivan Golub, teologo kaj poeto, kiu parolis al ni pri siaj renkontiĝoj kun la iama kardinalo Ratzinger. Carlo Sarandrea legis fine, kelkajn liajn poe-

mojn ĉerpitajn de lia poemaro "Lumo kaj Ombro" ĵus tradukita en Esperanton. Eksterprograme venis la helpepiskopo Ivan Šaško, kiu parolante en Esperanto, alportis la salutojn de la episkopo de Zagrebo, kardinalo Josip Bozanić. Poste ni eliris por viziti la apudan Muzeon de la beata kardinalo Alojzije Stepinac, kie fratulino rakontis la vivon kaj la travivaĵojn de la kardinalo kaj priskribis la aĵojn kaj la dokumentojn



Grupo de kongresanoj kun la episkopo antaŭ la katedralo de Sisak

garditajn en la Muzeo.

Posttagmeze, post la Sankta meso en la Katedralo, okazis la solena inaŭguro de la kongreso en la salono de la seminariejo kun la interveno de reprezentantoj de kroataj katolikaj asocioj kaj movadoj kiuj sin prezentis. Ni povis aŭskulti prelegojn de Branko Kobar, prezidanto de la Kroata katolika unuiĝo de instruistoj; de Đurđa Arbutina, franciskana de la tria sekulara ordeno, pri la Spirito de Asizo; de Jelica Stipaničević Mustapić kaj Anica Math de la Kroata unuiĝo de la katolikaj flegistinoj kaj medicinaj teknikistoj pri sano kaj malsano en la mesaĝoj de Johano Paŭlo II; de Nikolina Delaš de la Unuiĝo de la katolikaj skoltroj pri la skoltismo, kaj fine la IKUE-prezidanto Miloslav Šváček atestis pri la kontraŭreligia persekuto en Ĉeĥoslovakio dum la '70aj jaroj.

London ni havis tuttagan

pilgrimadon. Unue ni atingis Ludbreg kie en la jaro 1411 (do antaŭ 600 jaroj) okazis eŭkaristia miraklo. Tie ni partoprenis en la Meso en la paroĥa preĝejo kaj vizitis la novan pilgrimlokon. En Kroatio Ludbreg estas konsiderata la centro de la Mondo, pro tio ni faris fotojn ĉirkaŭ la bronza ronda plato centre de la placo, kiu indikas la centron de la mondo. De tie ni veturis al "Mariapoli Faro" de Križevci, urbeto de la Fokolarmovado, kie ni tagmanĝis sub granda kiosko kaj vizitis la aligitan belegan grek'-katolikan preĝejon.

Posttagmeze ni atingis la kastelon de Vrobovec por renkontiĝi kun la gastoj de la komunumo "Cenacolo", fondita en 1995 de itala monaĥino (patrino Elvira el Saluzzo) por la rekapabligo de droguloj. Ni tie recitis rozarion kun la junaj viroj promenante laŭ riverbordo, poste ni vespermanĝis kune kun ili

kaj kantis bondezire al ili kelkajn el niaj kantoj.

Mardon matene, post rozario antaŭ la bildo de la Virgulino ĉe la "Ŝtona Pordo" de Zagrebo, ni havis la ĝenerala kunsido de IKUE dum kiu la ĝenerala sekretario Carlo Sarandrea raportis pri la agado de la Centra Oficejo kaj de la landaj sekcioj, la financaj aferoj, la nova statuto de IKUE kaj la mastumado de la IKUE-sidejo en Romo. Dum la diskuto oni parolis pri la venontaj balotoj por la elekto de la nova estraro kaj pri la ebleco trovi italajn kandidatojn je prezidenteco. Pri la venonta ekumena kongreso oni decidis rezigni je la proponon de KELI kongresi en Germanio, ĉar la proponita loko estas malfacile atingebla. Oni revuis aliajn proponojn, pri kiuj oni findecidos. Por la IKUE-kongreso 2013 oni proponis la urbon Wadowice en Pollando, naskiĝloko de Johano Paŭlo la dua.

Posttagmeze ni veturis al Krašić, kie naskiĝis kaj mortis la beata kardinalo Aloizije Stepanic. Tie ni partoprenis en la Sankta Meso kaj vizitis la memorĉambron kie la kardinalo mortis. Tuj poste ni atingis Stojdraga traveturante grandan kaj belegan arbaron ĉe la landlimo de Slovenio. Tie ni vizitis la "Muzeon de uskoko" kaj la grek'-katolikan preĝejon de S-kta Georgo sur la supro de monteto. La pastro mem preparis al ni vespermanĝon. Ĉe tabloj, aranĝitaj ekstpladonere sur la herbejo,



En la grek-katolika preĝejo de Križevci

ni gustumis tipan lokan mangxajxon: specon de gulaŝo kun viando-pecoj, terpomoj kaj paŝto-buletoj.

Merkredon, post la Sankta Meso en la kapelo de la kongresejo, ni partoprenis serion de prelegoj. Komence prof. Boĵidar Nagy parolis pri la beata Ivan Merz kaj la interreligia dialogo; sekve la slovak-a IKUE-ano Pavol Petrik parolis pri la persekutado kontraŭ la Grek-katolika eklezio en Slovakio dum la komunisma reĝimo; la siberia IKUE-anino Marina Stepanĉeva parolis pri la “katolikoj en Siberio”; fine dank' al telefona kunligo, mons. Gabriel Anda, estrarano de IKUE kaj direktoro de la tiea Radio-maria, prelegis el Kamerunio, pri la evangelizado per komunikiloj.

Posttagmeze estis libera tempo, dum kiu ni vizitis la kongresan urbon Zagrebo.

Ĵaŭdon matene, post la Meso, estis alia vico de prelegoj. P. Tomislav Glavnik o.f.m., specializanto pri la kanona juro parolis pri la laikaj organizoj en la Eklezio. La kroata parlamentano Marjiana Petir parolis pri sia engaĝiĝo en la antaŭenigo de la kristanaj valoroj en la kroata parlamento kaj pri la kontraŭstaroj kaj minacoj estigitaj kontraŭ ŝi pro tio. Nia diakono János Kirsch parolis pri la hungaraj martiroj en la 20a jc. La primicanto Dario Paviša parolis pri la kroataj beatuloj kaj sanktuloj (laŭ la



Stojdraga: gr.kat. preĝejo

loka diro, “primicanto” estas nov-pastro, kiu ankoraŭ ne celebris sian unuan Meson; laŭ la loka kutimo, post la tagmanĝo, en la kapelo, li donis, al ĉiu el ni aparte, sian “primican benon”).

Posttagmeze, Miloslav Šváček montris lumbildojn pri la pasinta kongreso en Parizo kaj pri la Bibliaj tagoj en Werl, kaj Carlo Sarandrea instruis nin pri interreta etiketo. Poste ni atingis la Bazilikon de la Plej Sankta Koro de Jesuo en Zagrebo por reciti rozarion ĉe la tombo de la beata Ivan Merz.

Vendredon okazis tuttaga pilgrimo al la diocezo de Sisak, kie ni renkontiĝis kun la episkopo monsinjoro Vlado Košić, kiu ĉe nia alveno bonvenigis nin per regalo, poste en dioceza salono li prelegis pri la diocezo de Sisak kun aparta rilato al la kortuŝaj eventoj de la civila serba-kroata milito de la '90aj

jaroj, de li mem travivitaj kiel paroĥestro de ĉelima paroĥejo. Fine de la prelego ĉiuj ricevis lian libro-ateston “Paroĥestro ĉe la unua frontlinio” esperantigitan de Marija Beloŝević. Poste ni eniris la katedralon por la Sankta Meso celebrata en Esperanto de la episkopo kune kun niaj pastroj. Fine de la Meso ni veturis al bieno de la diocezo kie, ni tagmanĝis kune kun la episkopo mem.

Posttagmeze la episkopo akompanis nin al fortikaĵo de Sisak, ĉe la kunfluo de la riveroj Kupa kaj Sava, kie, en la jaro 1593 okazis fama batalo, en kiu la kristanaj trupoj sukcesis venki kontraŭ la turkoj.

Vespere okazis la kutima amuza adiaŭa vespero, kiu tradicie fermas niajn kongresojn.

Sabaton, post la fermo de la kongreso, ĉiuj pretiĝis por reheimeniri. Konklude, la laboroj de la kongreso, la pilgrimadoj kaj la turismaj vizitoj estis intensaj, amuzaj kaj ankaŭ kortuŝaj. Pro tio ni devas danki precipe Maria Beloŝević pro ŝia granda organiza laboro. Ankaŭ la vetero estis ĉiam agrabla. Ni ĝuis bonan kongreson. Fina surpriza rimarko por la italoj: la prelegantoj ne IKUE-anoj prelegis en la kroata kun simultana traduko fare de Maria Beloŝević, sed preskaŭ ĉiuj el ili scipovis la italan, pro tio en kelkaj momentoj ŝajnis al ni partopreni kvazaŭ en UECI-kongreso.

Tiziana Fossati

Aliaj fotoj videblas en interreto ĉi tie: <http://www.ipernity.com/doc/177224/album/243888>

Salutvorto de la zagreba helpepiskopo Ivan Šaško

Estimataj partoprenantoj de la Kongreso, karaj fratoj kaj fratinoj, karaj amikoj!

Estas bele esti ĉi tie kun vi laŭ la spirito de la etoso de Pentekosto.

Mi ĝojas kaj estas honoro por mi, ke mi povas persone saluti vin kaj alporti al vi la salutojn de nia zagreba ĉefepiskopo, kardinalo Josip Bozanić, kiu ĝojas pro la 64a Kongreso de la Internacia Unuiĝo de katolikaj Esperantistoj okazata en Zagrebo.

Estas simbola bunta aro da temoj, kiuj kunligiĝas kun la iom nekutima, sed instigas la ĉeftemo kun la titolo, aŭ pli precize citaĵo prenita el la Evangelio laŭ Luko: „**Vi estos malamataj de ĉiuj pro mia nomo. Kaj eĉ unu haro de via kapo ne pereos**”.

Mi konstatis, ke ĉiuj temoj estas kunligitaj per la esprimoj atestado de kredo kaj dialogo. Atestado kaj dialogo – kaj la unua kaj la dua estas tiel proksime ligitaj al la lingvo, al la parolo.

Kutime oni starigas la demandon, ĉu ni komprenas iun lingvon. Sed, en via kazo, kiu koncernas kristanismon, oni povas fari plian paŝon kaj demandi: ĉu nin komprenas la aliaj?

Mi menciis la misteron de Pentekosto, kiam la kristanaj anoncantoj estis tuj komprenataj de la aliaj, malgraŭ kultura diverseco. Tia estas atesto de la amo - ĝin ĉiuj komprenas. Unue oni komprenas la parolon de amo, kaj amo helpas lerni lingvon de kulturo kaj popolo. Antaŭkondiĉo por tio estas kompreni la Dian parolon en Krista ofero kaj atestado.

Karaj amikoj, vi venis al la lando kiu en sia radiko portas multajn spurojn de kristana atestado kaj dialoganta amo. Dankon pro via atento, dankon ĉar vi Kroation akceptis kiel parton de via atestado kaj kristana kulturo de viaj popoloj.

Dankon al vi pro via donaco de ĉeesto. Sentu proksimecon de la Eklezio de Kroatio kaj kontribuu al kuna parolo de la sama lingvo: tiu de la amo de Kristo.

(dissendis Marija Belošević)

Saluto del vescovo ausiliare di Zagabria Ivan Šaško

Egredi partecipanti del Congresso, cari fratelli e sorelle, cari amici!

È bello essere qui con voi secondo lo spirito dell'ethos della Pentecoste.

È per me una gioia e un onore di potervi salutare personalmente e portarvi i saluti del nostro arcivescovo di Zagabria card. Josip Bozanić, che si compiace del 64° Congresso degli Esperantisti cattolici che si tiene in Zagabria.

C'è un variopinto simbolico insieme di temi collegati con qualcosa di insolito, ma è stimolante il tema principale preso del Vangelo di Luca: “**Sarete odiati da tutti a causa del mio nome. Ma nemmeno un capello del vostro capo perirà**”. (Lc 21, 17-18)

Ho constatato, che tutti i temi sono collegati da testimonianze di fede e dialogo – l'una e l'altro così intimamente legati alla lingua e alla parola

Di solito si pone la domanda se noi conosciamo una data lingua. Ma, nel vostro caso, che concerne il cristianesimo, si può fare un passo ulteriore: ci comprendono gli altri?

Ho accennato al mistero della Pentecoste quando gli annunciatori cristiani erano subito capiti dagli altri, malgrado le diversità culturali. Tale è la testimonianza dell'amore - la capiscono tutti. Prima si capisce il discorso dell'amore e l'amore aiuta ad imparare la lingua della cultura e del popolo. Presupposto di ciò è comprendere la parola di Dio nel sacrificio e testimonianza di Cristo.

Cari amici, siete venuti in una terra le cui radici portano le impronte di cristiana testimonianza ed amore dialogante. Grazie per la vostra attenzione, grazie perché voi avete accettato la Croazia come parte della vostra testimonianza e cultura cristiana dei vostri popoli.

Grazie a voi per il dono della vostra presenza. Sentite la vicinanza della Chiesa Croata e contribuite a un comune discorso nella medesima lingua: quella dell'amore di Cristo.

(traduzione a cura della redazione)



Mons. Ivan Šaško



MALFERMITAJ AL LA TUTA MONDO

Rubriko zorge de frato Pierluigi Svaldi

Spezzare il pane per dire Dio

Nel libro degli “Atti degli Apostoli” noi possiamo leggere le esaltanti esperienze dei primi cristiani. Abbiamo già parlato di come essi ci tenessero alle istruzioni degli apostoli e a una vita di comunità. Ora ci resta da vedere come celebravano l’eucaristia, la nostra messa, e come pregavano insieme. È stato scritto, infatti, che i credenti della prima ora *«erano assidui nell’ascoltare l’insegnamento degli apostoli e nell’unione fraterna, nella frazione del pane e nelle preghiere»* (Atti 2, 42).

“Oggi è domenica, il giorno del Signore. Vuoi partecipare allo «spezzare il pane» con il nostro vescovo? Per noi è il momento più bello della settimana”. Questo poteva essere l’invito di un cristiano della prima ora verso qualcuno che si era dimostrato interessato di partecipare a qualche incontro dei nuovi credenti. Anche noi ci scambiamo questo genere di invito, dicendo semplicemente: “Vieni a messa con me, domenica?” Per «messa» intendiamo la celebrazione dell’eucaristia, il momento più importante e più intimo dei cristiani cattolici. Colpiti dal gesto che veniva fatto verso la fine della celebrazione, i primi credenti chiamavano la santa messa con il segno dello *«spezzare il pane»*.

Che sarebbe della nostra vita se ci togliessero via l’eucaristia con la sua immane pretesa di condivisione a tutto campo? Sono cadute tante processioni e devozioni centenarie; sono state dimenticate innumerevoli preghiere e riti di vita, ma non possiamo fare a meno dell’eucaristia, di questo

Dispecigi la panon por diri Dion

El la libro de «La Agoj de la Apostoloj» ni povas legi la ekzaltantajn spertojn de la unuaj kristanoj. Ni jam parolis pri la alta prikonsidero, kiun ili havis por la instruadoj de la Apostoloj kaj la vivo en komuneco. Nun necesas ke ni vidu kiel ili celebris la eŭkaristion, nian meson, kaj kiel ili preĝis kune. Estas skribite, fakte, ke la kredantoj de la unua horo *«aŭskultis konstante la instruojn de la apostoloj, vivis kune kiel fratoj, partoprenis en la dispecigo de pano kaj en preĝado»* (Agoj, 2, 42).

“Hodiaŭ estas dimanĉo, la tago de la Sinjoro. Ĉu vi deziras partopreni *«en la dispecigo de pano»* kune kun nia episkopo? Por ni ĝi estas la plej bela momento de la semajno.” Tiu ĉi povis esti la invito de la unuaj kristanoj al iu, kiu sin montris interesiita partopreni en kelka renkontiĝo de la novaj kredantoj. Ankaŭ ni interŝanĝas samtipajn invitojn, simple dirante: “Ĉu vi venos al la meso kune kun mi, dimanĉe?” Dirante «meson» ni celas la celebron de la eŭkaristio, la plej grava kaj intima momento de la katolikaj kristanoj. Impresitaj de la signo, plenumita ĉe la fino de la celebrado, la unuaj kredantoj nomis la sanktan meson *«la dispecigo de la pano»*.

Kio estus nia vivo se oni forprenus el ni la eŭkaristion kun sia grandega postulo de senmezura kunpartigo? Malaperis multaj religiaj procesioj kaj centjaraj devotaĵoj; sennombraj preĝoj kaj viv-ritoj estas forgesitaj, sed ni ne povas nin deteni de la eŭkaristio, de ĉi tiu signo de *«la dispecigo de la*

segno dello «spezzare il pane».

La Chiesa, l'assemblea dei credenti vive grazie all'eucaristia, grazie alla speciale e reale presenza del Signore che si dona sempre di nuovo. Senza questo frequente incontro con Cristo, la Chiesa a poco a poco si stancherebbe nel suo impegno di apertura a tutto il mondo: diventerebbe folclore, ricordo storico. Grazie alla comunione eucaristica con il suo Signore, la Chiesa vive e cresce con l'obiettivo di condividere tutto sull'esempio di Cristo, l'uomo per gli altri.

Cristo, il Figlio di Dio e vero uomo, ha condiviso pienamente se stesso, si è dato nel pane spezzato, mettendosi veramente nelle nostre mani. È questo lo speciale evento che sempre si ripete in ogni celebrazione eucaristica. Qui sta la grandezza dell'eucaristia: Cristo condivide se stesso con noi.

Se la vita del Cristo è nostra, allora la nostra vita prende vigore, si riaccende l'impegno mai esaurito di posizionare questo fatto nel centro del nostro cuore, così da poterlo comunicare come una ricchezza speciale: più la doni e più essa aumenta. Allo stesso tempo si scopre che perseverare nello «spezzare il pane» nella vita di tutti i giorni, con qualunque persona o cosa, significa accendere il vero motore di ogni forma di cambiamento sociale del mondo.

Dovunque il gesto del Signore che spezza il pane viene accolto, lì nasce una nuova vita interiore, lì cresce la nuova società che ogni cuore desidera. In questa società non esiste più l'estraneo che non mi riguarda o che mi fa paura, ma il fratello che mi chiama e che aspetta il pane spezzato, indispensabile per trovare lui stesso una dimora nell'amore.

Ogni vero esperantista si accosta come fratello a chiunque chiedi una dimora nell'amore. Sempre disposto a dare quello che ha e che è, l'esperantista tesse relazioni per la gioia di mettere in risalto il gesto del Signore che è stato «riconosciuto nello spezzare il pane» (Lc. 24,35).

pano».

La Eklezio, la asembleo de la kredantoj vivas dank' al la eŭkaristio, dank' al la aparta kaj reala ĉeesto de la Sinjoro, kiu ĉiam denove sin foroferas. Sen tiu ĉi ofta renkontiĝo kun Kristo, la Eklezio iom post iom malentuziasmiĝus en sia devigo esti malfermita al la tuta mondo: ĝi iĝus folkloro, historia memoro. Dank' al la eŭkaristia komunio kun sia Sinjoro, la Eklezio vivas kaj kreskas celante kunpartigi ĉion laŭ la ekzemplo de Kristo, la homo por la aliaj.

Kristo, la Filo de Dio kaj vera homo, tute kunpartigis sin mem, foroferis sin per la rompita pano, vere metante sin en niajn manojn. Ĉi tiu estas la aparta evento kiu denove okazas en ĉiu eŭkaristia celebrado. Ĉi tie estas la eŭkaristia grandeco: Kristo kunpartigas sin mem kun ni.

Se la vivo de Kristo estas nia, do nia vivo fortikiĝas, ekbrulas la neniam elĉerpita sindevigo lokigi ĉi tiun agon interne de nia koro, tiel ke ni povas komuniki ĝin kiel specialan riĉecon: ju pli multe vi donas ĝin, des pli multe ĝi kreskas. Samtempe oni eltrovas ke persisti «en la dispecigo de pano» dum la ĉiutaga vivo kune kun ia ajn persono aŭ aĵo, signifas startigi la veran motoron por ĉiu formo de socia ŝanĝiĝo de la mondo.

Kie ajn la ago de la Sinjoro dispeciganta la panon estas akceptata, tie naskiĝas nova intima vivo, tie kreskas nova societo, dezirata de ĉiu koro. En ĉi tiu societo ne plu ekzistas la fremdulo, kiu min ne koncernas aŭ timigas min, sed la frato alvokanta min kaj atendanta la rompitan panon, nepre necesan por ke li mem trovu restaĵojn en la amo.

Ĉiu vera esperantisto frate alproksimiĝas al iu ajn petanta loĝejon en la amo. Ĉiam preta por doni tion kion li havas kaj kio li estas, la esperantisto plutenas rilatojn por ĝoje evidentigi la agon de la Sinjoro «rekonita dum la dispecigo de la pano» (Luk. 24,35).

Dirite inter ni ...



008

EN LA TRAJNO

- Ho, finfine. Mi sukcesis trafi la trajnon.
- Ĉu vi kuris?
- Jes, mi kuregis por atingi la lastan vagonon.
- Kial vi alvenis tiom malfrue?
- Ĉar okazis multaj aferoj. Sed antaŭ ĉio mi preferus sidiĝi.
- Konsentite, ni iru antaŭen kaj ni trovu du sidlokojn en iu kupeo.
- Sed unue estus bone, ke ni interkonatiĝu: mi estas Karlo. Kaj vi, kiel vi nomiĝas?
- Mi estas Georgo Mi ĝojas!
- Ĉu vi loĝas en Milano?
- Jes, de ĉiam. Miaj gepatroj estas milananoj.
- Ha, jen. Ĉi tie estas tute libera kupeo.
- Bone. Ni formetu niajn pakaĵojn kaj ni sidiĝu.
- Jes, ni povos trankvile klaĉadi.
- Mi metu mian sakon ĉi tien.
- Kaj mi metos tien mian valizon.
- Ja, tio estas bona aranĝo.
- Nun ni sidiĝu.
- Ĉu vi preferas apudfenestran sid-lokon?
- Por mi estas same. Mi ne havas preferojn.
- Nu, estu mia la ĉe-fenestra loko. Kaj laŭ la antaŭen-moviĝo de la trajno.
- Ĉu vi suferas vetur-malsanon?
- Ĝenerale ne, se la vojaĝo estas mallonga.
- Kaj se la vojaĝo estas longa?
- Ĉiuokaze, se la vojaĝo estas longa, mi

IN TRENO

- Oh, finalmente. Sono riuscito a prendere il treno.
- Hai corso?
- Sì, ho fatto una gran corsa per raggiungere l'ultimo vagone.
- Perché sei arrivato così tardi?
- Perché sono successe molte cose. Ma, prima di tutto, preferirei sedermi.
- D'accordo, andiamo avanti e troviamo due posti per sederci in qualche scompartimento.
- Ma come prima cosa sarebbe bene se facessimo la nostra reciproca conoscenza: io sono Carlo. E tu, come ti chiami?
- Io sono Giorgio. Piacere!
- Abiti a Milano?
- Sì, da sempre. I miei genitori sono milanesi.
- Ah, ecco! Qui c'è uno scompartimento completamente libero.
- Bene. Mettiamo via i nostri bagagli e sediamoci.
- Sì, potremo chiacchierare tranquillamente.
- Metto qui la mia borsa.
- Ed io metterò là la mia valigia.
- Certo, questa è una buona sistemazione.
- Ora sediamoci.
- Preferisci il posto vicino al finestrino?
- Per me è lo stesso. Non ho preferenze.
- Ebbene, a me il sedile vicino al finestrino. E secondo la direzione di corsa del treno.
- Soffri per il viaggio?
- Di solito no, se il viaggio è breve.
- E se il viaggio è lungo?
- In tutti i casi, se il viaggio è lungo, pre-

- preferas vojaĝi per trajno anstataŭ per aŭtomobilo.
- Nu, vi ne ŝatas vojaĝi per aŭtomobilo.
- Tio estas vera: mi ne ŝatas vojaĝi per aŭtomobilo.
- Kaj per aviadilo? Ĉu vi ŝatas vojaĝi per aviadilo?
- Nu, per aviadilo mi ŝatas vojaĝi, kiam la vojaĝoj estas tre longaj.
- Kaj se vi devus elekti inter ŝipo kaj aviadilo?
- Ha, sendube mi preferus la aviadilon. Unue, ĉar ĝi estas pli rapida, due, ĉar mi provis marmalsanon, kaj ĉe mi ĝi estas vere terura.
- Ĉu vi multe vojaĝis per ŝipo?
- Mi provis kelkajn fojojn, sed tiaj vojaĝoj, la per-ŝipaj, tute ne allogas min.
- Tamen, la perŝipaj krozadoj estas ĝenerale tre bone organizitaj.
- Mi tion scias, kaj mi konsentas.
- Kaj tio ne allogas vin?
- Jes, ja, tio allogas min, sed se mi pensas pri marmalsano, kiu povus min trafi, tiam mi rezignas tre volonte.
- Kontraŭe, mi havas tre bonajn spertojn tiurilate.
- Evidente vi ne suferas marmalsanon.
- Eble, sed kiam mi krozadas sur ŝipo, tiam mi ne pensas pri marmalsano. Mi pensas nur pri amuzo.
- Kaj vi pravas. La krozadoj estas sufiĉe multekostaj. Oni devas profiti la tutan tempon, kiun oni disponas sur ŝipo.
- Kaj mi profitas.
- Tamen, vi ne sukcesos konvinki min.
- Mi ne celis al tio. Mi volis nur diri, ke la plej multo el la krozadantoj ne zorgas pri marmalsano.
- Nu; bonan amuzon al tiuj bonŝanculoj.
- ferisco viaggiare con il treno invece che con l'automobile.
- Allora non ti piace viaggiare in automobile.
- Questo è vero. Non mi piace viaggiare in automobile.
- Ed in aereo? Ti piace viaggiare in aeroplano?
- Ebbene, mi piace viaggiare in aeroplano quando i viaggi sono molto lunghi.
- E se dovessi scegliere fra nave ed aeroplano?
- Ah, senza dubbio preferirei l'aeroplano. In primo luogo perché è più rapido e, in secondo luogo, perché ho provato il mal di mare, e per me è veramente terribile.
- Hai viaggiato molto in nave?
- Ho provato alcune volte, ma viaggi di quel tipo, quelli con la nave, non mi attirano affatto.
- Tuttavia, le crociere in nave sono generalmente organizzate molto bene.
- Lo so, e sono d'accordo.
- E questo non ti attrae?
- Sì, certamente, questo mi attrae, ma se penso al mal di mare che potrebbe venirmi, allora rinuncio molto volentieri.
- Io, al contrario, ho esperienze molto buone in quel senso.
- Evidentemente non soffri il mal di mare.
- Può darsi, ma quando vado in crociera su una nave non penso al mal di mare. Penso solamente al divertimento .
- Ed hai ragione. Le crociere sono abbastanza costose. Si deve approfittare di tutto il tempo che si ha, su una nave.
- Ed io ne approfitto.
- Tuttavia non riuscirai a convincermi .
- Non miravo a questo. Volevo solamente dire che la maggior parte dei croceristi non si cura del mal di mare.
- Va bene, buon divertimento a quei fortunati.

KUN LA GEAVOJ

- Ho, jen ni alvenis.
- Jes, vi alvenis, sed mi devas pluiri.
- Ankoraŭ mallonge, tamen.
- Vi pravas, ankaŭ mia vojaĝo ne estas longa.
- Mi deziras al vi bonan daŭrigon de la vojaĝo.
- Kaj mi deziras al vi bonan restadon ĉe la geavoj.
- Dankon.
- Saluton.
- Saluton.
- ***
- Saluton, avinjo.
- Saluton, Karlo.
- Lasu, ke mi kisu vin.
- Certe, kiel vi fartas?
- Mi fartas bone, dankon.
- Ĉu vi malsatas?
- Jes, mi estis en la lernejo la tutan matenon kaj mi laboris multe.
- Nu, vi foruzis multajn energiojn.
- Kaj nun mi devas ilin reakiri.
- Bone, ni baldaŭ ĉetablighos.
- Kaj kiam oni manĝas ĉe vi, avnjo...
- Ne estu tro flatema.
- Bone, bone, tamen ĉe vi oni manĝas tre bone.
- Ĉu vi ne manĝas bone en via hejmo?
- Certe, ke mi manĝas bone en mia hejmo, sed via kuirarto estas tute aparta.
- Dankon, ruzulo.
- Nu, kie estas avĉjo?
- Ho, li venos baldaŭ.
- Ĉu li ne estas hejme?
- Ne, li eliris.
- Ĉu li eliris kun la hundo?
- Jes, ankaŭ la hundo estas kun li.
- Kiam ili revenos?
- Mi jam diris, ke ili revenos baldaŭ, ankaŭ ĉar via avo certe malsatas je ĉi tiu horo.

CON I NONNI

- Oh, ecco, siamo arrivati.
- Sì, tu sei arrivato, ma io devo continuare.
- Ancora per poco, tuttavia.
- Hai ragione anche il mio viaggio non è lungo.
- Ti auguro una buona continuazione del viaggio.
- Ed io ti auguro una buona permanenza presso i nonni.
- Grazie.
- Salve.
- Salve.
- ***
- Ciao, nonna.
- Ciao, Carlo.
- Lascia che ti dia un bacio.
- Certamente; come stai?
- Sto bene, grazie.
- Hai fame?
- Sì, sono stato a scuola tutta la mattina ed ho lavorato molto.
- Senza dubbio hai sprecato molte energie.
- Ed ora devo riacquistarle.
- Bene, ci metteremo presto a tavola.
- E quando si mangia da te, nonna...
- Non esagerare con i complimenti.
- Bene, bene, tuttavia da te si mangia molto bene.
- Non mangi bene a casa tua?
- Certo che mangio bene a casa mia, ma la tua arte culinaria è del tutto speciale.
- Grazie, furbone.
- Ma, dove è il nonno?
- Oh, verrà presto.
- Non è a casa?
- No, è uscito.
- È uscito col cane?
- Sì, anche il cane è con lui.
- Quando torneranno?
- Ho già detto che torneranno presto, anche perché tuo nonno ha certamente fame a quest'ora.

- Sed kien ili iris?
- Ili iris ĝis la centra placo.
- Ĉu tien, kie estas ankaŭ la ĵurnalvend-
ejo?
- Jes, ĝuste tien. Ili iris aĉeti kelkajn tag-
gazetojn.
- Ha, jes, mi scias, ke avĉjo ĉiam ĝisdati-
ĝas rilate tion, kio okazas en la mondo.
- Vi pravas, li legas ĉiam kaj ĉion.
- Estas ĝuste
- Kaj poste li pridiskutas la aferojn kun la
amikoj dum li prenas kafon ĉe la drinkejo.
- Ĉu mi iru renkonte al ili?
- Se vi volas. Avĉjo estos kontenta.
- Kaj ankaŭ la hundo.
- Ĝis poste.
- Ĝis!

- Saluton, avĉjo.
- Ha, vi jam alvenis.
- Jes. Saluton, Hundo.
- Vidu, kiel kontenta estas Hundo.
- Jes, li saltas kaj festas.
- Kaj li ankaŭ volas montri sian konten-
tecon lekante vin.
- Brava, Hundo! Sed ne leku tro multe
mian manon.
- Li tuj ĉesos.
- Jes, tion li faras nur dum la unuaj mo-
mentoj.
- Jen, nun ĉio estas en ordo.
- Ni povas daŭrigi nian vojon.
- Ni daŭrigu.
- Avnjo jam pretigis la tagmanĝon.
- Ni rapidu.
- Jes, ni rapidu. Posttagmeze mi devos
studi.
- Ĉu vi devos studi multe?
- Jes, sufiĉe multe, ĉar en la venontaj
tagoj mi havos pridemandadojn.
- Bone, nun ne pensu pri la demandoj,
sed pensu, ke via stomako volas plen-
iĝi.
- Nu, ni kaptu la bonajn okazojn.

- Ma dove sono andati?
- Sono andati fino alla piazza centrale.
- Là dove c'è anche la rivendita dei gior-
nali?
- Sì, proprio là. Sono andati a comperare
alcuni quotidiani.
- Ah, sì, lo so che il nonno si aggiorna
sempre su ciò che accade nel mondo.
- Hai ragione, legge sempre e tutto.
- È giusto.
- E poi discute le cose con gli amici men-
tre prende il caffè al bar.
- Vado loro incontro?
- Se vuoi. Il nonno sarà contento.
- E anche il cane.
- A dopo.
- Ciao.

- Ciao, nonno.
- Ah, sei già arrivato.
- Sì. Ciao, "Hundo".
- Guarda com'è contento "Hundo".
- Sì, salta e fa festa.
- Sì, e vuole anche mostrare la sua con-
tentezza leccandoti.
- Bravo, Hundo! ma non leccare troppo
la mia mano.
- Smetterà subito.
- Sì, fa così solamente i primi momenti.

- Ecco, ora tutto è in ordine.
- Possiamo continuare la nostra strada.
- Continuiamo.
- La nonna ha già preparato il pranzo.
- Affrettiamoci.
- Sì, affrettiamoci. Nel pomeriggio do-
vrò studiare.
- Dovrai studiare molto?
- Sì, abbastanza, perché nei prossimi
giorni avrò delle interrogazioni.
- Bene, ora non pensare alle domande,
ma pensa che il tuo stomaco vuole
riempirsi.
- Ma sì, cogliamo le buone occasioni.

Nia eta Parnaso

Rubrica dedicata alla Poesia

Rubriko dediĉita al Poezio


Ricordo di un tramonto
sul Monte Cronio (Sicilia)

Memoro pri sunsubiro
ĉe monto Kronio (Sicilio)

EMOZIONI.

EMOCIOJ.

*Quando il sole tramonta
a ridosso del Cronio
il monte avvampa
di rosso scarlatto
che poi,
ad oriente,
degrada in rosa...
viola... turchino...
Volute infinite
d'immense fasce rosate
solcano il cielo e
s'inabissano nel mare
che le accoglie,
le incorpora
in mille e mille creste
dorate,
in un brillio incantato.
Momento magico...
Il mio essere:
corpuscolo vibrante
infinitesimo
dell'universo.*



*Kiam la suno subiras
ŝirme de Kronio
la monto ekflamas
je ruĝskarлата koloro
kiu poste,
ĉe oriento,
stompiĝas al rozo...
al violo... al bluo...
Senlimaj spiraloj
el grandegaj rozbendoj
sulkas la ĉielon kaj
sinkas en la maron
kiu ilin gastigas,
ilin enkorpiĝas
en miloj da krestoj
oritaj,
en ravita brilado.
Sorĉa momento...
Mia estaĵo:
vibranta korpusklo,
senlime malgranda ero
de l' universo*

Anna Amorelli Gennaro

(esperantigis Norma Cescotti)

SCIIGOJ EL AFRIKO

*Rubrica rivolta alle notizie dal mondo esperantista africano.
Rubriko celanta doni sciigojn el Afrika Esperantujo.*

R.D. del CONGO (Goma)

I nostri lettori più affezionati ricorderanno certamente che a Goma c'è Alexis Asumani Bengantundu corrispondente di don Duilio Magnani già dal 2004. Da parecchi anni egli si occupa dei ragazzi orfani o abbandonati della sua città. Per questo motivo il Cer-Es, a suo tempo, lo aveva aiutato nella costruzione di una casa (*Domo de Frateco*) che fungesse da orfanotrofio e centro di socializzazione per questi ragazzi.

Come è stato spiegato durante il congresso UECI di Santa Giustina, il Cer-Es pur continuando ad occuparsi di attività intraprese in Africa, non intende più finanziare le attività in Goma. Per questi ragazzi è venuta così a mancare una regolare sovvenzione per pagare le tasse scolastiche e, senza questo aiuto, non avrebbero più potuto frequentare la scuola. Alexis allora si è rivolto a una sua corrispondente di Trieste e questa al gruppo esperantista triestino che ha contattato l'UECI. Ne abbiamo parlato in Santa Giustina dove, come riportato nell'ultimo numero di *Katolika Sento*, abbiamo raccolto 215 €. A questa somma è stato aggiunto quanto

l'UECI aveva in cassa per il bonfarado fino a raggiungere 500 € che sono stati spediti a Goma giusto in tempo per l'inizio del nuovo anno scolastico.

Ora Alexis ci scrive per ringraziarci:



Alexis Asumani Bengantundu

02/08/2011

Saluton karega Giovanni D.

Tutkore, ni dankas vin pro via monhelpo al niaj geknaboj. Sabate kaj lundo, en nia lando oni ne laboris pro tio, mi ne rapide ricevis la monon ĉe Money Gram. Sed hodiaŭ mi ricevis 688\$. Dankon al Katolika Sento.

La geknaboj, la IKUE-anoj, mi kaj mia familio tutkore dankas ĉiujn kontribuantojn al nia agado. Daŭrigu pensi pri nia grava agado. Via helpo estas grava.

Estas nun ke, ni komprenas ke, tiu agado, enkadrigi

orfojn, estas Dia agado.

Kial tion mi diras?

La pasinta jarstudo 2010-2011, ni alfrontis seriozan malhelpon: kelkaj orfoj kaj delasitaj infanoj ne partoprenis la jarfinajn ekzame-nojn pro la fakto ke, ili ne pagis ĉiujn lerneajn kotizojn, kaj havis ŝuldon.

Ni tamen daŭrigis mediti kaj preĝis Dion por ke, ebligu monhelpo al tiuj infanoj.

Karega, vi kaj gefratoj de Katolika Sento estas iloj, kristalaj pokaloj per kiuj Dio manifestas Sin por nin helpi. Kun tiu monhelpo, ni kredas pri ebla lerneja vizito de la orfoj. Do, ni aĉetos lernejan vestaĵon, lerneajn materia-lojn kaj eĉ pagos parteton de la lerneja kotizoj.

Rimarku ke, jam de 21 jaroj la gepatroj de la infanoj subtenas komplete la alfab-etigon de iliaj infanoj.

Komence de septembro, vi ricevos fotoĵon kie, la geknaboj ricevas lernejan materialojn.


Denove, ni tutkore dankas vin.

Karega, vi estas en nia ĉiutaga preĝo.

*Alexis ASUMANI
BENGANTUNDU el
Goma/RD Kongo.*

78° Congresso della Federazione Esperantista Italiana

Torino 20 -27 agosto 2011



Torino: Chiesa Gran Madre di Dio

Da sabato 20 a sabato 27 agosto si è tenuto a Torino, nel centro convegni di Villa Gualino, il 78° Congresso FEI.

Villa Gualino è posta su un colle sulla riva sinistra del Po e da essa si gode uno splendido panorama sulla città e sulle Alpi. Tema del congresso era: "... kaj nun ni estu eŭropanoj".

Il congresso ha visto l'adesione di più di 270 persone provenienti da 30 paesi. Circa la metà erano italiani, il gruppo estero più numeroso (40 persone) è stato quello dei polacchi che sono venuti con una loro corriera (come fanno spesso).

Sabato pomeriggio era dedicato principalmente all'accoglienza dei congressisti. Alle ore 18,30 presso la chiesa della Gran Madre di Dio, in riva al Po, padre Alfonso Aguado, dei legionari di Cristo, ha celebrato una Santa Messa in esperanto con la partecipazione di una trentina di esperantisti. Durante la S. Messa padre Alfonso ha più volte ricordato don Duilio Magnani che gli ha regalato i *Mes-Libroj* ed è stato molto contento di poterli finalmente usare per la

prima volta. Sempre nel pomeriggio sulla riva del Po davanti alla chiesa c'è stata la "Verda Foiro" in cui i vari gruppi esperantisti hanno potuto esporre le loro mercanzie.

Domenica mattina c'è stata l'inaugurazione ufficiale con la presenza del presidente dell'UEA Probal Dasgupta che ha tenuto il discorso di apertura, sono poi intervenuti tra gli altri l'assessore al turismo del comune di Torino e il sindaco di Mazara del Vallo, città sede del congresso del prossimo anno.

Nel pomeriggio si è tenuta l'assemblea annuale dei soci e le elezioni della nuova dirigenza. Il nuovo presidente della FEI è Aldo Grassini

Il congresso è stato ricco di eventi culturali, artistici e di svago. Numerose le escursioni in Torino e dintorni: Museo Egizio, Palazzo Madama, Palazzo Reale, Superga, Sindone, Museo del Cinema, Mole Antonelliana, Venaria, Valle di Susa, Stresa, Vercelli ...

Vari incontri, spesso contemporanei, hanno affrontato interessanti temi culturali esperantisti, rappresentazioni teatrali, presentazione di libri, corsi di esperanto a diversi livelli e anche un corso di italiano, esami di 1° e 2° grado dell'Istituto italiano di Esperanto ed esami KER di livello B2 e C1. Ogni sera spettacolo musicale.

L'appuntamento per il prossimo anno è in Sicilia a Mazara del Vallo.



Kongresejo

Informoj el la lokaj grupoj

Rubrica a disposizione dei gruppi locali - Rubriko je dispono de la lokaj grupoj

RIMINI

Il dottor Renato Berti ci segnala due articoli comparsi sulla stampa riminese. Ne diamo una sintesi.

Da: "**La voce di Rimini**" di domenica 17 luglio, in un articolo dal titolo "*L'Africa chiama volontari*" dopo aver descritto le opere già realizzate da Cer-ES e Fondazione Esperanto in Congo e Benin continua:

"L'ultima delegazione che si è mossa da Rimini, e che comprendeva Renato Berti Nicolangelo Vitullo e Giuliano Rocchi, ha puntato a regolarizzare, con un'associazione locale, le vecchie proprietà (oggi al 50% del-Cer-Es).

Recentemente la Fondazione Esperanto ha acquistato nella zona un terreno su cui si andranno a costruire delle strutture produttive per offrire lavoro agli orfani, nel frattempo cresciuti. I lavori, seguiti dal geometra Giancarlo Sormani, partiranno nel periodo di secca in luglio e saranno eseguiti dagli abitanti di Lokossà. Da Rimini si può contribuire in tanti modi: con le adozioni, associandosi al Cer-Es, oppure con il volontariato, andando sul posto ed insegnando un mestiere ai giovani africani, che sia l'imbianchino o l'idraulico, l'elettricista o il falegname:

Quello che serve, prioritariamente, è gente disposta ad impegnare qualche mese della propria vita in un'attività di volontariato sul posto. Ai concittadini disposti a farlo la Fondazione offre tutto il proprio appoggio, fino ad arrivare ad un contributo per le spese di viaggio. Per avere informazioni, 0541 709709 -www.ceresonlus.it."

Da: "**Corriere di Romagna**" di sabato 23 luglio, in un articolo titolato "Torna l'isola delle rose - Presto la versione in esperanto" si scrive:

"L'avventura dell'Isola non si ferma: è infatti in preparazione la versione in esperanto, lingua ufficiale della nazione fondata dall'acare ingegnere bolognese Giorgio Rosa. Il progetto nasce proprio dalla collaborazione con la Fondazione esperantista "Don Duilio Magnani - Enzo Scatassa" ed era stato fortemente voluto da don Duilio, il sacerdote scomparso nell'aprile 2010, a lungo parroco a San Giuliano Mare e grande divulgatore della "lingua universale", tanto da aver convinto persino papa Giovanni Paolo II a impartire la benedizione pasquale e natalizia urbi et orbi in questa lingua. Don Duilio è stato anche uno dei protagonisti del film di Cinematica. Il

doppiaggio in esperanto, a cura dell'attrice Nicoletta Fabbri, è in corso proprio in questi giorni e la nuova versione del film, pronta dopo l'estate, sarà diffusa attraverso i canali degli esperantisti nel mondo, permettendo così a questa storia riminese di girare per i cinque continenti."

Carla Poli, vicepresidente del Cer-Es e coordinatrice dei progetti culturali, ha chiesto a **Josias Armel Houssou**, uno dei ragazzi adottati a distanza tramite il Cer-Es, che scolaricamente sta promettendo bene, di inviarci un suo articolo in esperanto anche per dimostrare la sua conoscenza della lingua. Eccolo:

En 2001, dum kongreso de Esperanto, Houssou Gaston kaj patro Don Duilio renkontis sin por la unua fojo. Post esti aŭdinta la plendojn de Gaston koncerne sia vilaĝo, la eksa prezidanto de CER-ES promesis helpon al Gaston en la nomo de lia asocio por ripari iom tiujn problemojn. Tiucele, CER-ES helpis Gaston por la realigo de:

1. Centro de sano (2004);
2. La kapelo Patro Pio de Tozounmé (2004);
3. Puto por la lernejo kaj la hospitalo (2003);

4. *Du pontoj sur la vojo Gbédji-Tozounmé (2005);*
5. *La konstruo de du haloj de klaso kaj direkto al la elementa lernejo Esperantista de Tozounmé (2005);*
6. *10 dormejoj (5 por la knabinoj kaj 5 por la knaboj), loko de studo, manĝoĉambro kaj kuirejo (2006);*
7. *Halo de klaso kaj halo de komputiko financita de la helpanto de Raffaello Gobi al la kolegio Esperantista de Koudo (2008);*
8. *Du aliaj haloj de klaso financita de CER-ES (2010)*
9. *Kaj la oficoj de la lernejo en procezo de konstruo... Danke al ĉiuj ĉi laboroj plenumitaj de CER-ES en Benin de 2004 al 2011, 189 infanoj havis la diplomon CEP; 87 personoj estas baptitaj; pluraj homaj vivoj estis savitaj kaj 107 novuloj naskiĝintaj; 14 personoj havis la diplomon de BEPC ... Kaj pluraj senlaboraj personoj iras trovi iom da laboro en la lernejo.*
- La loĝantaro de Lokossà, la infanoj de CPIRS kaj la grupo de Esperanto "Mano la Mano" per mia voĉo atestas al vi niajn sincerajn dancojn kaj rekonajn.*
- Mi estas nuntempe sur la dek sepa leciono de Esperanto. Estas al vi nun aprezi mian nivelon en Esperanto.*
- Grandan dankon*
- HOUSSOU Josias Armel.*

QUOTE ASSOCIATIVE

Ass. ordinario con <i>Katolika Sento</i> (SO)	.. 21,00 €
Ass. giovane con <i>Katolika Sento</i> (SG)	.. 10,50 €
Ass. familiare senza <i>Katolika Sento</i> (SF)	10,50 €
Ass. ordinario con <i>Espero Katolika</i> (SOE)	42,00 €
Ass. sostenitore con <i>Katolika Sento</i> (SS)	.. 42,00 €
Ass. sostenitore con <i>Espero Katolika</i> (SSE)	84,00 €
Solo abbonamento a <i>Katolika Sento</i> (AK)	10,00 €
Solo abbonamento a <i>Espero Katolika</i> (AE)	21,00 €

Per i versamenti: c/c postale n. 47127675 intestato a: *Unione Esperantista Cattolica Italiana U.E.C.I*
 codice IBAN: IT66 R076 0101 6000 0004 7127 675
 Codice BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

COMITATO CENTRALE U.E.C.I.

Presidente: Giovanni DAMINELLI,
Responsabile dei congressi: Giovanni CONTI
Vice presidente: fra Pierluigi SVALDI
Segretario/cassiere: Marco POLITI
Responsabile giovanile: Paola AMBROSETTO
Responsabile culturale: Norma COVELLI
Consulente informatico: Tiziana FOSSATI,
Consulente editoriale: Carlo SARANDREA
Assistente Eccles.: mons. Giovanni BALCONI
Grafica di *Katolika Sento*: Mario GUILLA

*Tutte le comunicazioni alla redazione di *Katolika Sento*, vanno spedite al presidente UECEI:
 via Lombardia, 37 – 20099 Sesto S. Giovanni (MI)
 telef. 02.2621149 – e-mail: katolika.sento@ueci.it*

ELEZIONI

Il prossimo anno si deve rinnovare il Comitato Centrale UECEI.

A tale proposito il nostro statuto recita:

Per l'eleggibilità è richiesto che ogni candidato: abbia compiuto il 16° anno di età; sia iscritto all'U.E.C.I. da almeno due anni consecutivi, compreso quello in corso; sia presentato da un Presidente di Gruppo o da tre membri del Comitato Centrale uscente o da almeno dieci Associati aventi diritto di voto.

Chiunque ne abbia i requisiti e si voglia candidare è pregato di comunicarlo al segretario dell'UECEI entro il 15 marzo 2012. Per la raccolta delle firme di sostegno alla presentazione della candidatura ci si può rivolgere al presidente dell'UECEI.

Indirizzo del segretario UECEI:

Marco Politi via Montemartini, 4 - 20139 Milano - markpol00@yahoo.it

AMUZE

Ĉiuj ajn rajtas kontribui sendante al ni siajn humoraĵojn, kondiĉe ke ili estu en Esperanto.



(el www.gioba.it) - sendis Tiziana Fossati)

En lernejo

La instruisto pridemandas la junajn lernantojn:

- Kio okazis en Italio en la jaro 1861?

Neniu respondas krom la eksterlandano Ĉang:

- En 1861 naskiĝis la itala reĝolando.

- Bone, brava! vi pravas. Kaj kio okazis en 1870?

Nur Ĉang, levas la manon.

Tial la instruisto rimarkas:

- Infanoj, kiel eblas ke li konas nian historion pli bone ol la italoj!?

Bonvolu respondi, Ĉang!

- La itala reĝolando festis sian naŭnan jaron.

Nov-patrinaj

Du patrinoj interparolas pri siaj beboj:

- Mia filo paŝas jam ekde tri monatoj.

- Ho, kiu scias, kiom malproksime li iris nun!

Ŝparemulo

Sinjoro eliras el la centra stacidomo de Milano, kaj demandas taksiston:

- Kiom da mono por porti min en placo Leonardo da Vinci?

- Dekkvin eŭrojn.

- Bone, nun mi scias kiom da mono mi ŝparas irante tien piede.

En restoracio

Gastejestro sin turnas al nova kliento, kiu ĵus finmanĝis en lia restoracio:

- Ĉu vi manĝis bone?

- Se la supo, kiun mi manĝis, estus klara kiel la vino, kiun mi trinkis; kaj se la vino, kiun mi trinkis, estus malnova kiel la anaso, kiun mi manĝis; kaj se la anaso, kiun mi manĝis, estus dika kiel la kelnero, kiu servis min, tiam ĉio estus bona.

Peto

Paroĥestro je la fino de la meso anoncas:

- Gefratoj, la tegmento de la preĝejo estas damaĝita, oni devas elspezi iom da mono por ripari ĝin.

Tiurilate mi havas du aferojn por diri:

La unua estas bona kaj la dua malbona.

La bona estas, ke ni havas sufiĉan monon.

La malbona estas, ke la mono troviĝas ankoraŭ en viaj poŝoj.

Ofertoj

En aŭtobuso, dum ekskurso de Esperantistoj, pasaĝero ĉe mikrofono anoncas:

- Mi perdis mian monujon entenantan dumil eŭrojn. Kiu retrovos ĝin, tiu ricevos de mi rekompencan je ducent eŭroj.

Oni aŭdigas voĉon:

- Mi ofertas kvarcent!

Eĥo

- Pacjo, kio estas eĥo?

- Ĝi estas la ununura afero en la mondo, kiu malpermesas al via patrino eldiri la lastan vorton.

Grava aserto

- Se la direktoro ne retiras kion li diris al mi, mi ĉi tie plu ne laboros!

- Kion li diris?

- Vi estas maldungita.